

ILEI raportas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2022-10-15 ĝis 2023-01-15.

Eventoj

Renovigo de la retejo de ILEI

Daŭras la esplorado de la retejo de ILEI fare de la laborgrupo, konsistanta el Alessandra MADELLA, Cristina BOLLINI, Maximiliano GARCIA kiu kunlaboras kun la ĉefprizorganto Jozefo Nemeth. La celoj de renovigado estas krei pli allogan aspekton, konservinte ĉiujn ekzistantajn materialojn, krom la jam nebezonataj kaj ne plu uzeblaj. La Estraro sukcesis trovi senpagan helpon de la profesia programistino Cristina BOLLINI, membro de la itala sekcio. Ŝi multe laboris por kompreni kaj klarigi la sistemon kaj funkciadon de la retejo. Fakte la retejo de ILEI sidas sur la servilo, kies uzo estas disponebligata al ILEI senpage fare de E@I. Necesas esplori amason da materialoj kaj savi la plejmulton. Se plene ŝanĝi la retejon, tio kostus 2000-3000 eŭrojn kaj poste ILEI ne plu povus kontroli ĝin. Tial estas laborgrupo speciale aprobita fare de la komitato por la celo de renovigado. Ne estos monelspezoj, krom tio jam farita por akiri la skanaĵojn de malnovaj numeroj de IPR por la nova arkivo konstruata de Jozefo Nemeth en la retejo de ILEI. Alia problemo estas havigi la datumbazon de nia membraro al la retejo kongrue kun la leĝoj pri datumprotektado. Nun survojas la solvado.

Cele al progreso de landaj sekcioj de ILEI Alessandra Madella reverkis la formularojn por membriĝo en la Ligo kaj abono de JA (Juna Amiko). La enhavo de la novaj formularoj estis detale traktita ene de la Estraro dum la reta kunsido kaj strikte korektita rilate al la leĝo pri datumprotektado kaj reguloj de ILEI. Danke al la volontula laboro de Cristina Bollini la formularoj estas rekte entajpeblaj kaj subskribeblaj komputile, do oni ne devas printi kaj poste skani ilin plenigite. Tio, eventuale, multe plifaciligos kaj la membriĝon (<https://www.ilei.info/Aligxilo.pdf>) kaj la abonon de JA (https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf) kaj simpligos la transiron de la membro-administrado al la nova respondeculo. Ĉiuj jam faritaj renovigoj estas videblaj ĉe ilei.info. Ne prokrastu viziti!

Prezentado de la ekzamen-sistemo de IIE dum la konferenco de AALA

La vicprezidanto de ILEI, Alessandra Madella prezentis la ekzamen-sistemon de la Itala Instituto de Esperanto dum la 8-a Internacia konferenco de AALA (Asian Association for Language Assessment) la 26-28-an de oktobro, organizita de Anna Universityin Chennai, Barato. La raporton vidu ĉe: <https://esperanto.cri.cn/2023/01/05/ARTIgmKselOJjAM6z6WQjnCI230105.shtml?spm=C78862.Ph5HEAhyLcMg.S95520.2>

ILEI-konto ĉe la Nederlanda banko

La Estraro aktive serĉas solvon por la problemo kun la konto de ILEI ĉe la Nederlanda banko, kiu nun estas blokita. Por tio estas preparitaj necesaj dokumentoj kaj okazas oficiala korespondado.

Membro-administrado

La inĝeniero Hamzeh SHAFIEE el Irano estis aprobita de la Komitato kiel la nova membro-administranto post demisio de Sebastian CYPRYCH, kiu dum jaroj - t.e. ekde 2013 ĝis la fino de 2022 - sindoneme kaj aprezinde plenumis la taskon. Nun okazas solvado pri nova sistemo de la membro-administrado kongrue kun bezonataj leĝoj kaj reguloj.

La Estraro

La Estraro aprobis la Laborplanon por ILEI por 2023-2024, kiu tekstas jene:

- * Restarigo de la administra sistemo de ILEI kaj prizorgado de la vivo de ILEI de la administra vidpunkto (Ahmad, Marija, Karine, Elena, Hamzeh, Renato)
- * Renovigado de la retejo de ILEI (Alessandra, Max Garcia, Cristina Bollini, la Estraro)
- * Dokumentado pri la renovigado de la retejo de ILEI (Alessandra kaj Cristina)
- * Kreado de la paĝoj pri IPR kaj JA en la retejo de ILEI (Jozefo, Stano, Cristina).
- * Regula prizorgado de la retejo de ILEI (Jozefo)
- * Publikigado de IPR (Jozefo, Ahmad, Fernando, Mirejo, Alessandra)
- * Publikigado de JA (Stano, Elena, Mirejo)
- * Ekzamenoj de ILEI/UEA (Karine)
- * Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro (15-a de decembro) (Alessandra)
- * Dezirinda okazigado de plua eldono de Premio La Torre (Ahmad, Alessandra, Renato, Familio La Torre)
- * Realigado de libro pri Premio La Torre, kun la ISBN-kodo de ILEI (Radojica)
- * Publikigi la librojn de la Aktoj de la ILEI-simpozioj 2020-2021, se eble kun la ISBN-kodoj de ILEI (Fernando)
- * Publikigi aliajn librojn pri ILEI kaj/aŭ edukado, se eble kun la ISBN-kodoj de ILEI (Fernando, Alessandra)
- * Daŭre verki trimonatajn raportojn (Elena, Alessandra)
- * Teni bonajn rilatojn kun UEA (Ahmad) kaj TEJO (Fernando)
- * “Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lerneano en la tuta mondo”: plenumigi almenaŭ 10 realigojn de la leciono por neesperantista klaso (niaj membroj)
- * ‘Esperanto-kursaro Tibor Sekelj’: starigi kursojn en almenaŭ 5 landoj/lingvoj, en kiuj nun ne okazas retaj kursoj de iu ajn tipo (Ahmad kaj Renato)
- * Instruado en publikaj lernejoj: realigi la iniciaton ‘30 Oraj Horoj’ en Italio kaj bone dokumenti ĝin per libro, videoj, intervjuoj kaj artikoloj por faciligi imitadon (Laura, Bruĉjo, Alessandra).

- * Instruado en publikaj lernejoj: realigi iniciatojn similajn al la ‘30 Oraj Horoj’ en almenaŭ tri landoj krom Italio (niaj membroj)
- * ILEI-kongreso en Linjano (Laura, Bruĉjo, Fernando, Karine, Alessandra, LKK)
- * ILEI-simpozio de Linjano (Fernando aŭ Alessandra, depende de la elektita temo)
- * Sekva ILEI-kongreso 2024 (Laura, Karine + aliaj depende de la elektita loko)
- * Daŭre okazigi ĉiumonatajn renkontiĝojn de universitatanoj (Ahmad, Renato, Radojica, Fernando)
- * Daŭre okazigi ILEI-forumojn (Radojica)
- * Instruista trejnado dum la kongreso ktp. (Radojica kaj Laura)
- * Prizorgado de la jutuba kanalo de ILEI (Alessandra, Aristophio, Mirejo kun la helpo de Max Garcia)
- * Prizorgado de la aliaj retaj sociaj komunikiloj de ILEI (Didier Janot, Laura kaj aliaj)
- * Daŭrigado kaj perfektigado de la ‘Homa Ĉeno’; (Max Garcia, Alessandra, aliaj)
- * Prezenti Esperanton al almenaŭ 3 NROj, precipe pri paco, ter-savado, lingvaj rajtoj kaj minoritatoj (Ahmad, Max Garcia, Didier Janot)
- * Batali kontraŭ analfabeteco per instruado en almenaŭ unu lando (Ahmad)
- * Sendi observantojn al Unesko por videbligi niajn agadojn tie kaj klopodi akiri oficialan kunlaboran rilaton. Daŭre videbligi la projektojn jam plurlingve prezentitajn por la pasinta premio Hamdan (Kungfua Kuniklito,’ 30 Oraj Horoj’, Edukado.net) (Alessandra, Didier Janot, Max Garcia, Emmanuel Desbrières kaj aliaj)
- * Se eblas, partopreni en la venonta premio Hamdam pri edukado kun taŭga kandidato (Alessandra).
- * Pretigi varbadajn materialojn pri ILEI por Unesko ktp (Alessandra, Max Garcia, Bruĉjo, Didier Janot, Emmanuel Desbrières kaj aliaj).
- * Sendado de lernolibroj al Afriko (Renato, Karine)

Kunordigebla kaj kunordigata kun ĝi estas la **Laborplano de Eŭropa Komisiono de UEA**, en kiu la ILEI-estrarano Radojica Petrović reprezentas ILEI kaj balkanajn landojn:

1. Retaj kursoj pri Esperanto en ĉiu eŭropa lando en la landaj lingvoj
2. Informi pri Esperanto EU-instancojn kaj popolojn kaj verki tiucelajn informilojn
3. Labori por ke la ŝtatoj deklaru Esperanton nacia kultura heredaĵo
4. Mezeŭropa Regiona Kunlaboro kaj Balkana Landa Kunlaboro
5. Subteni la revivigajn klopodojn restarigi LA en Makedonio Norda, Islando kaj por starigi labor-grupojn en Malto kaj Kipro.
6. Esplori la vivipovon de la LA en Bosnio-Hercegovino, Irlando kaj Grekujo.
7. Analizi la rimedojn en Belorusio, Moldavio cele al starigo de funkciantaj asocioj.
8. Esplori la eblojn por refortigo aŭ restarigo de LA en Estonio kaj Portugalio.
9. Fronti la akutan bezonon pri generacia reunigo tra Eŭropo

Enkadre de la punkto 4. Aurora Bute kaj Radojica Petrović kunvokis por la 22a de januaro rekunvenon de reprezentantoj de mezeuropaj kaj balkanaj landoj. Unu el la centraj temoj estos retaj kursoj de Esperanto.

La Estraro decidis doni aŭspicion al la projekto de nia samideano kaj Dumviva Membro de ILEI, HUANG Yinbao Trezoro. Temas pri produktitaj de li filmoj por disvastigi ĉinan kulturon per Esperanto. Ĉiuj filmoj enhavas paroladojn en Esperanto, kaj subtekstojn dulingvajn (Esperanto kaj la ĉina). La filmoj estas publikigitaj ĉefe sur ĉinaj retaj kanaloj kaj foje sur Jutubo (tio tro malfacilas por ĉinoj). Per tiaj filmoj ĉinaj esperantistoj povas facile plibonigi sian Esperanton, kaj ne-esperantistoj povas ĝui ĉinajn kulturojn laŭ la ĉinaj subtekstoj. Kaj la ne-esperantistoj povas ekscii pri Esperanto pro la filmoj, ĉar ĉiuj filmoj per ĉina lingvo diras, ke la parolado sur la filmo estas en Esperanto. Do, la filmoj fariĝas ankaŭ reklamo por Esperanto.

La estrarano Laura Brazzabeni ĝisdatigis la retgrupojn ilei-komitato kaj ilei-sekciestroj-kaj-reprezentantoj.

La Komitato

Decembre okazis granda kaj grava komitat-kunsido. Pro la atingita kvorumo estis aprobitaj gravaj decidoj (krom jam menciitaj):

- Estis rajtigita la nova financa kontrolisto. Ekde tiam la financa komisiono konsistas el du personoj: sinjoro Simon SMITS el Nederlando kaj sinjorino Nvard MANVELJAN el Armenio.
- Estis aprobita la Jarraporto por 2022.
- Estis aprobita la Laborplano de ILEI por 2023-2024 (vidu supre).
- Estis aprobitaj la Financa Raporto por 2021, la Buĝeto-2022 kaj Buĝet-propono por 2023, la Raportoj de la Kontrola Komisiono por 2020 kaj 2021.
- Estis elektita por la nova periodo la Elekta Komisiono konsistanta el: Aurora BUTE (Rumanio), Zsófia KÓRÓDY (Germanio) kaj Aristophio Andrade Alves FILHO (Brazilo).
- Estis nuligita la C-kategorio por ILEI-membriĝo.
- Estis decidite, ke ILEI ne sekvu la regularon de kongresoj por 2023 por havi komunajn kotizojn, ĉar la kongreso estos kunkongreso kun TEJO. Same estos komuna programo.

Mireille GROSJEAN estis elektita kiel Honora Membro de ILEI. *Sincerajn gratulojn al Mirejo!*

Sekcioj

Kadre de la renovigo de la ILEI-paĝaro, laŭ impulso de ties laborgrupo kaj de Jozefo Nemeth, daŭris laboro pri aperado kaj ĝustigo de la datumoj de la sekciestroj kaj reprezentantoj kongrue kun la leĝoj pri personaj datumoj. La Estraro decidis aperigi kompletan ret-adresaron de lokaj ILEI-funkciuloj por havi klaran bildon pri strukturo kaj agado de la Ligo kaj faciligi la kontakton de interesiĝontoj. Poste sekvis giganta laboro pri kontrolado de datumoj kaj ilia kongruo kun leĝoj pri personaj datumoj.

La rezultoj jam videblas danke al enormaj klopodoj de Marija Jerković, Renato Corsetti kaj Alessandra Madella kunlabore kun Jozefo Nemeth. Vizitu <https://www.ilei.info/instancoj/sekcioj.php>

Marija Jerković kaj Renato Corsetti en la venontaj monatoj daŭre kontaktos la malaperintajn sekciojn por konkrete helpi ilin pri reorganizado.

Kapabligo

Sukcese disvolviĝas kunlaboro de ILEI kun Afriko. 10 kilogramoj da malnovaj revuoj IPR kaj JA estis senditaj de Stano Marček al François Lo Jacomo, kiu kunportos ilin al Senegalo.

Renato Corsetti komencis sian kampanjon kolekti monon por sendi lernolibrojn al Afriko. Jam estas senditaj la unuaj 10 lernolibroj de Peter Weide al la kampadejo en Zimbabvo.

Internacia Ekzamena Komisiono de ILEI/UEA havos novan konsiston. Lastfoje ĝi estis reelektita en la jaro 2015, sed laŭ la Ekzamena Regularo ĝi devas esti renovigata ĉiun trian jaron fare de la komitatoj de ILEI kaj UEA laŭ akordigita propono de la du Estraroj. Atendante la novan elekton, la pluservanta Prezidanto dume estos Karine Arakelyan. Radojica Petrović ricevis estraranan taskon komunikiĝi kun UEA pri pluevoluigo de la priekzamenaj interrilatoj kaj de la ekzamenoj mem, inkluzive de eventuale nova ekzameno pri Esperanto-kulturo.

Nun per la Zoom-konto de la projekto Esperanto-kursaro Tibor Sekelj (EToSo) okazas kursoj perfektigaj en Esperanto por azianoj kaj afrikanoj kaj elementaj kursoj de Esperanto en la indonezia, vjetnama, rusa kaj albana (en la pasinteco okazis kursoj en la persa, kurda, franca, svahila/sŭahila, araba). Estas traktata la demando por okazigo de la kursoj en aliaj lingvoj kiel la ukraina kaj la albana.

Projektoj

Komuna legado

Por la Tago de Libro en decembro 2022, laŭ organizado de Alessandra Madella, estis elektitaj du verkoj: la novelo “Antimilitisto” de Lusin kaj la poemaro “La Stranga Butiko” de Raymond Schwartz. Ambaŭ estas elŝuteblaj el la retejo de ILEI kun enkondukoj.

Jen estas du reagoj pri la legado:

“Anoj de Saitama Esperanto-Societo en Japanio legis la novelon “Antimilitisto” de Lusin okaze de komuna legado de la Tago de libro 2022. Elekto de la novelo estas ĝustatempa ĉar tie kaj ĉi tie tra la mondo homoj militas. Ni sincere diskutis pri la filozofio de Mo-zi t.n. nemilitismo kaj pacifismo. Komuna legado donis al ni bonan okazon pensi pri homoj. “Ne malvenki sen militi” estas nia konkludo”.

“En Serbio Radojica Petrović inkluzivigis la komunan legadon en kurson A2 por komencintoj. Kursmaterialo por unu el la lecionoj estis la sprita versaĵo “Liriko kaj Praktiko” el la proponita libro de Raymond Schwartz. Tiel, en gaja etoso, kelkaj novaj vortoj kaj parolturnoj, kaj grajneto de Esperanta kulturo, pliriĉigis la lingvokonojn kaj esprimkapablon de la kursanoj”.

Do, bonas, ke Esperanto-projektoj de ILEI vekas tiujn gravajn diskutojn. *Aliĝu ankaŭ vi!*

Kongreso-2023

Grava anonco: la unua plej favora aliĝperiodo laŭ la decido de du Estraroj – de ILEI kaj TEJO – estas plilongita ĝis la 2023/01/31. Ne prokrastu aliĝi al la ĉi-jara komuna kongreso en la norda Italio!

Dume survojas preparado por la kongreso. Por nun:

- alvenis la kontrakto kun la kongresejo en Linjano por ILEI kaj TEJO. La antaŭpago de ILEI devas esti 1000 eŭroj;

- la Estraro aprobis LKK-n. Ĝi inkluzivos Prezidanton kaj por 3 membroj el ILEI kaj TEJO. Flanke de ILEI eniros Brunetto Casini kiel Prezidanto, Laura Brazzabeni (estrarano pri kongresoj kaj kasisto), Alessandra Madella (programo) kaj Federico Tomasetig (ekskursoj). Flanke de TEJO eniros Albert Stalin Garrido kiel Prezidanto kaj ĉefrespondeculo, Giovanni de Lucia (koncertoj) kaj alia reprezentanto de TEJO;

- LKK faris grandegan laboron por kongruigi kongresajn regulojn de ILEI kaj TEJO al akceptebla por ĉiuj variantoj: temas pri diferencoj en la aliĝkotizoj de ambaŭ organizoj por diversaj homgrupoj kaj landkategorioj; tiucele LKK prezentis al la Komitato rezultan ekvilibritan tabelon kun taŭga solvo por ambaŭ asocioj. Ĉiuj ŝanĝoj kontraŭas interesojn nek de ILEI nek de TEJO kaj validos nur por ĉi-jaro;

- LKK ankaŭ pristudos la regulojn kaj tradiciojn pri kotizoj por familianoj kaj aldonos modifojn; por familiano restis la saman de la regularo - 50%;

- TEJO akceptis la koncepton de ILEI pri unu- aŭ du-taga partopreno (pro la simpozio, kiun TEJO ne havas), sed ili ne proponas la du-tagan partoprenon. Ĉiuj kongresanoj rajtos partopreni en la programeroj de ambaŭ organizoj.

Survojas preparado de la Seminario. Nun konstruiĝas kunlaboro por tio kun aliaj organizoj. Ekzemple, la trejnseminario kunlabore kun Itala Instituto de Esperanto.

Dume aliĝis 50 partoprenontoj. *Ne prokrastu aliĝi ankaŭ vi!*

Eldonado

Survojas preparado por Aktoj de la Simpozioj fare de Fernando Pita, por la publikaĵo pri Premio La Torre fare de Renato Corsetti kaj Radojica Petrović, kaj por la publikaĵo de Esperanta traduko de la verkaro de Antonietta Bernardoni fare de Alessandra Madella.

Alessandra Madella estas finverkanta sian libron pri la propedeŭtika aspekto de Esperanto, publikotan de Edistudio (en la projekto “30 oraj horoj” kun Itala Instituto de Esperanto).

Universitato

Pludaŭras la ĉiumonataj renkontiĝoj de la universitata grupo pere de la Zoom-konto de IrEA.

Alessandra Madella reprezentis Zaozhuang-Universitato kaj ILEI en la 8-a Internacia Konferenco de Azia Asocio por Lingva Taksado (AALA). Ĝi okazis inter la 26-a kaj la 28-a de oktobro ĉe Universitato Anna de Ĉenajo (Chennai), en la suda barata ŝtato Tamil Nadu, kun la titolo “Klasĉambro-bazata taksado en kaj preter la nova normalo: Defioj kaj ebloj”. La organizantoj akceptis la prelegon de Alessandra pri la novaj ekzamenoj de Itala Instituto de Esperanto, kiuj estas nun klopodantaj adopti la fokuson pri kompetentoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). Raportoj pri tio legeblas en IPR, la bulteno de FIPLV de decembro 2022 kaj en Ĉina Radio Internacia: <https://esperanto.cri.cn/2023/01/05/ARTIgmKselOJjAM6z6WQjnCI230105.shtml>.

IPR

Kadre de la renovigado de la retejo de ILEI estas planata (kaj farata) kolekti kaj meti la tutan arkivon de IPR en skanita formo en la paĝaron. La ĉefprizorganto de la paĝaro, Jozefo Nemeth, faris grandegan laboron tiucele, serĉante kaj skanante multegajn numerojn. Parto jam estas, parto estas konservita danke al la laboro de Zsófia Kóródy. La Estraro interkonsentis kun la Esperanto-Centro de Herzberg-am-Harz pri transdono de malnovaj revuoj. La adreso de la nova arkivo: <https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php>.

La Estraro fare de la kasisto Karine Arakeljan kaj la nova membro-administranto Hamzeh Shafiee solvadas la problemon de nericevo de la revuoj de abonantoj el LIBE. La estraro invitas la samideanojn, kiuj ne akurate ricevis la revuojn en 2022, kontakti ilin aŭ la redaktorojn pri tio.

La Estraro analizis la liston de senpagaj ricevantoj de IPR cele al redukto de la buĝeta defcito de ILEI. Tiu listo estas jam malnova kaj bezonas ĝisdatigon.

Kaj, kiel kutime, la skipo penas riĉigi la revu-numerojn per la plej freŝaj materialoj.

JA

Ekde nun aboni nian revuon Juna Amiko estos pli facile danke al la nova aliĝformularo. Jen estas rekta ligilo al ĝi en la retejo de ILEI: https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf sur la paĝo <https://www.ilei.info/revuoj/index.php?lingvo=eo> necesas nur klaki kaj rekte aboni.

Bonvenon!

ILEI en la Reto

Nova filmo

En la jutuba kanalo de ILEI aperis la filmo en Esperanto *La Silka Vojo* de MA-GA FILMOJ (Alessandra Madella kaj Maximiliano Garcia):

<https://www.youtube.com/watch?v=fYWUwtqeArI>

En la kanalo de EsperRadio (aŭ Facebook aŭ youtube) aperas filmetoj, informoj pri ILEI, pri la kongreso kaj aliaj eventoj, ekzemple pri la Tago de libro. *Bonvolu, viziti kaj spekti!*

Kunlaboro kun enmovadaj institucioj

Kun UEA

Por la Tago de Lernado-2023 dum UK en Torino estas elektita la temo “La mondo en mia klaso: pripensante pri enmigrintoj”. La Estraro bonvenigas ĉiujn spertojn rilate al tiu temo!

François Lo Jacomo, estrarano de UEA, afable bonvolis porti al la Afrika Kongreso en Senegalo revuojn de ILEI por disdonado al la partoprenantoj.

Aurora Bute, estraranino de UEA, afable organizis la partoprenon de pluraj rumanaj samideanoj en la kvara epizodo de la Homa Ĉeno de ILEI.

Kun TEJO

Tri gajnintoj de la TEJO-konkurso “KonSciu” okazinta dum VK iĝos membroj de siaj landaj sekcioj de ILEI kaj ricevos bitan version de IPR.

Daŭre progresas ankaŭ la komuna laboro de preparado por Linjano 2023.

Kunlaboro kun ekstermovadaj institucioj

UNESKO

En nomebro ILEI partoprenis en la internacia evento de NRO-oj ĉe UNESKO. Re prezentis la Ligon sinjoro Didier Janot, kiu loĝas en Parizo. Estis preparitaj fare de Alessandra Madella novaj informiloj pri ILEI kaj ĝiaj novaj projektoj. Sinjoro François Lo Jacomo senpage printis la materialojn. Do, danke al tiuj kunlaboroj ILEI ne havas elspezojn ĉi-jare por rilatoj kun UNESKO. *La Estraro kore dankas niajn samideanojn pro tiom valora helpo!*

FIPLV

La bulteno de FIPLV de decembro 2022 publikigis artikoleon pri Esperanto de Alessandra Madella.

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu elkorajn dankojn! *Apartaj dankoj iru al la korea sekcio, al nia finna samideanino kaj aliaj homoj, kiuj subtenis eblecon por homoj de nepagipovaj landoj membriĝi en ILEI kaj/au ricevi JAN.*

Sekretario de ILEI:

Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI:

Ahmad Reza Mamduhi

2023-01-15